

Numero: 255.  
Aŭgusto 2013.

21-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

# VESPERTO



Redaktanto:  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár  
Béla király u. 44.  
H-7400 HUNGARIO  
Telefono: 82/ 410-664  
Retadreso: [espbela@t-online.hu](mailto:espbela@t-online.hu)  
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro  
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

# Sunbrilo



Ridas Suno kaj donacas al ni karan varmon. La sunradioj karesas nin milde, kiel patrino sian etulon. La sunradioj gaje konsolas nin, se hazarde ni estas malfeliĉaj.

Ho, kara somera Suno, brilu en la tuta jaro kaj donu varmon eĉ en la frostaj vintraj monatoj! Sur la terglobo ne estu homo kiu suferos pro la malvarmo!

Ekzistas homoj, kiuj vintre frostmortas. En ilia hejtilo ne estas hejtaĵo kaj la flamoj neniam ekflagras donante varmon en la vintra ĉambro. Domanoj plorante sidas varme vestitaj kaj ili envias kiuj povas hejti.

Sed mi konas homojn, kiuj suferas ne pro la fizika malvarmo. Ilian koron kovras jam depost jardekoj la frideco de la indiferenteco, kio infektas la korpon de lia proksimulo kaŭzante grandan domaĝon en la homa societo. Kara sunbrilo bonvolu degeli ĉi tiun froston, ĉar tiam eble ankaŭ la zamenhofa lingvo povos disvastiĝi sur la terglobo. En la frostaj koroj la belega ideo ne trovas konvenan grundon por meti la etan semon de la komuna lingvo de la homaro. Se ĉi semo ne povos elkreski, tiam ni homoj restos en eterna mallumo.

Do, kara sunbrilo ne hezitu, radiu tra la tuta Tero!

**-Redaktanto-**



# Pontolingvo

Iu viro rakontis:

"Mi havis strangan sonĝon. Kvazaŭ ĝi estintus vera. Mi sonĝis, ke mi eltrovis pontolingvon, kiu plifaciligis la ĉiutagan homan kontakton sur ĉiu tereno. Ĝi estis grandioza lingvo. Oni povis ellerni ĝin rapide kaj facile.

Oni benis min, kial mia artfarita lingvo helpis solvi la babelan lingvoĥaoson. Ne estis pli lingvomiskomprenoj, se oni vojaĝis eksterlanden, kie mia lingvo estis parolata. La homaro unuanime akceptis mian lingvon kaj post kelkaj jaroj jam amasoj parolis kaj uzis ĝin.

Ĝi estis tre simpla lingvo. En la lernejoj ĝi estis instruata, kiel devigita lernobjekto. Ĉu vi scias, kio estis la plej interesa? Certe vi rememoras kiom ni koleris pri la devigite instruata fremda lingvo. Tio ofte ŝanĝiĝis laŭ la politika vento. Dum la homa vivo estis instruata ankaŭ du - tri lingvoj. Ĉiufoje oni diris al mi, ke ĵus lernata lingvo estas la plej valora kaj ĉiu devas ellerni ĝin. Post iom da tempo la direkto de la vento ŝanĝiĝis kaj ni devis eklerni alian lingvon.

Mia lingvo rapide pruvis sian vivkapablon kaj baldaŭ ĉiu parolis ĝin.

Kiom belega sonĝo ĝi estis! Bedaŭrinde mi vekigis matene kaj tiu ĉi sonĝo forflugis.

... aŭ tamen ne?"

\*

Ankaŭ ni ofte sonĝas simile kaj matene ĉiufoje ni trompiĝas, kial nia amata lingvo ankoraŭ ne disvastiĝis tra la tuta terglobo. Ni nur esperas en iu tago Esperanto vere fariĝos la dua gepatra lingvo de la homaro.

Bedaŭrinde ĝi havas multe da malamikoj, kiuj faras barilon antaŭ la Internacia Lingvo.

Kial tiu ĉi kolero kontraŭ ĝi? Por mi tio estas granda enigmo. Ja, Esperanto plifaciligus ankaŭ ilian vivon.

Kion fari, por ke la zamenhofa lingvo disvastiĝu kaj ĝi estu vaste uzata?

**-Ŝaŝa-**



# Piedfingre

-Sonkoly Éva-

Ŝi singarde pikmetis inter la fingrojn la folion...  
tiun tagon. Ŝi pakis. La kovrilo de la skatolo antaŭ  
nelonge ankoraŭ brilis, ĝi havis ian eksterordinaran  
magion. Ŝi rigardis mire ĝin. Kio okazis, ke nun ĝi  
ŝajnas tiom trouzita?

-Kion vi faras? – demandis la viro.

-Mi kolektas memorojn, mi kunportas ilin.

-Vi ne devas kolekti, ĉe mi ilin vi ĉiam trovos –  
li rigardis al iu bildo.

-Kiu scias, kiom longe? – glatigis la virino siajn  
lacajn fruntofalojn.

-Tio dependas nur de vi – li flustradis kaj li tiom  
mistere turnis sin al ŝi per duonfermitaj okuloj, sed  
la virino certe sciis, bone ŝi vidas ĉion, ŝi nur  
sekretas.

Ĉiam ŝi havis sekretojn, kaj ŝi serĉadis inter ili,  
kvankam estintus pli bone lasi ilin kaŝite.

-Mi foriras – ŝi diris subite - ,kaj serĉis la  
rigardon de la viro.

-Kien vi rapidas? – ŝi aŭdis la  
malproksimiĝantan voĉon.

...sed ja ĵus li estis tie ĉi. Ŝi ĉirkaŭrigardis.  
Neniu.

Ŝia koro ekpulis kaj poste iom ĝi ĉesis pulsi.

-Ne, nur ankoraŭ unufoje....

Ŝi imagis la ĝisnunajn belajn tagojn... la pluraj  
jam ne gravis.

-Ĉu sekretoj? – ŝi ekmemoris pri la vorto.

Singarde ŝi eklevis ĉi tiun lastan kaj ŝi metis ĝin  
en la trouzitan skatolon. Ŝi surmetis ĝian kovrilon.

Ŝi iris al la fenestro. Ŝi rigardis malproksimen,  
sed dume ŝi atentis la pordon, ŝi atendis... ĉiam ŝi  
atendis.

Ŝi aŭdis malfortan frapeton.

Ŝi kovris la fenestron per kurteno, la filtritaj  
lumoj piedfingre kaŝiris en la ĉambro, ian  
eksterordinaran, intiman duonlumon ŝutis post la  
paŝojn.

Ŝi fermis la pordon, kaj Li staris tie tutkorpe  
ridetante.

-Mi tre atendis vin! – ŝi flustris.

-Mi scias! – diris la viro, kaj poste ili ne parolis  
plu.

Post kelkaj horoj ŝi tenis en sia mano novan  
folion... precize ĉi tiun... kaj longe ŝi rigardis en la  
spegulon, kvazaŭ tie estus trovata la respondo je ĉiu  
sekreto.

(Tradukis: Apáti Kovács Béla)

„Sonkoly Éva estas Kapoŝvarana poetino kaj  
verkistino. Ŝiaj poemoj kaj verkaĵoj temas pri profundaj  
homaj sentoj. Ili meritas la disvastigon ankaŭ en Esperanto  
kaj aliaj fremdaj lingvoj.”

# Poezio

## Obskuro de Hendrik ADAMSON elestonigis H. DRESEN

Torturas nokt-obskuro,  
mi sola en la dom', —  
tra vitroj, ho, teruro,  
algapas min fantom'.

Surbuŝe rid' satana,  
rigora kiel frost'.  
Ja tiu ĉi rikano  
penetras ĝis la ost'.

Pro kio grince premas  
ĝi al la vitro sin,  
foriras kaj revenas,  
embuskas kun obstin'?


Ekkovras frunton ŝvito,  
simila al glaci';  
kun koro frostigita  
rigardas mi al ĝi.

Ne farus senparola  
min tiu ĉi turment',  
se vidus stelon solan  
mi sur la firmament'.

Mi dirus: "Jam sufiĉas,  
ne ludu, iru for!"  
Sed plu ja ne vidiĝas  
por mi la stela or'.

Terur' en nokt' senluma  
alstrabas min sen vort',  
en vundoj ĝi fingrumas,  
forpeli — mankas fort'.

Torturas nokt-obskuro,  
mi sola en la dom', —  
tra vitroj, ho, teruro,  
algapas min fantom'.



# Pri imaga vojaĝo

-Fantasta rakonto-  
XII.

La grafo daŭrigis la prelegon. En la salono estis sentebla la kontenteco. La ĉeestantoj ĉiuj feliĉe kapjesadis post ĉiu frazo. Ŝajne ili ĉiuj samopiniis kun la grafo Bonfarulo. Eble nur mi estis nervoza en la salono. Homoj sidantaj apud mi ridetis, kaj iu virino estanta malantaŭ mi tuŝis mian ŝultron kaj flustris al mi.

-Grandioza homo estas la grafo. Ĉu ne? Ni estas la elektitaj civitanoj de la venonta mondo.

Mi ne respondis al ŝi. Kion respondi? - mi ne sciis. Min tre ĝenis la tuta sceno, kiu ĉirkaŭbaris ĉiun.

Mi aŭdis belajn promesojn pri nova mondo, kiu estiĝos sur tiu ĉi artefarita insulo.

Mia timo ne ĉesis, eĉ de tempo al tempo ĝi plifortiĝis, kaj mi komencis farti malbone.

Bonŝance iu rimarkis tion kaj eksaltis.

-Ĉi homo tre malbonfartas - li diris.

Flegistoj alvenis kaj mi estis portita al proksima, malgranda ĉambro. Oni kuŝigis min sur longan kanapon. Baldaŭ kuracsimila viro enpaŝis kaj demandis:



-Kio okazis, sinjoro?

-Mi ne sias - mi respondis spiregante apenaŭ ricevante aeron. Eble la ĉambro estis tre malgranda kaj senaera por tiom multe da homoj.

La kuracisto ekzamenis min kaj post iom da tempo li diris al sia koleginino, kiu intertempe envenis la ĉambron.

-Nenio grava, Li estas novulo kaj lia organo ne toleras la antiradiojn, kiuj transformas ĉiun alveninton el la malnova mondo.

Ankaŭ ŝi ekzamenis min kaj ŝi konsentis.

-Baldaŭ li alikutimiĝos kaj fartos pli bone.

Unu vorto, la antiradio tre ĝenis min kaj kolektante kuraĝon mi demandis:

-Kio estas tiu antiradio? Ĉu ĝi estas danĝera je la homa organo?

-Foje, foje jes, sed ĝi ne kaŭzas morton. Sinjoro oni ne devas timi de ĝi. Ĝenerale dum mallonga tempo ĉiu alikutimiĝas kaj rapide resaniĝas. Do post kelkaj tagoj ankaŭ vi estos tute sana kaj forgesiĝos pri ĝi - konsolis min la kuracisto. - Nun mi donas al vi pilolojn, kiujn vi devas enbuŝigi ĉiutage trifoje post la manĝo. Jen la unua.

Li transdonis al mi skatoleton enhavante helflavajn, malgrandajn pilolojn, el kiuj mi tuj devis enbuŝigi iun.

Apenaŭ pasis kvin minutoj mi endormiĝis kaj mi memoris pri nenio.

Vekiĝante mi ĉirkaŭrigardis kaj mi trovis min en ŝiphaveno. Proksime al mi homoj staris.

-Li malfermis siajn okulojn - diris maljuna virino. - Li ne mortis. Li vivas.

Jes mi vivis. Sed kie mi estas? - Mi demandis de mi. - Kie estas la grafo Bonfarulo kaj la aliaj. Eĉ ankaŭ la insulo malaperis. Mi denove estis en mia malnova, sovaĝa mondo. Malaperis ĉio, kion ĝis nun mi vidis aŭ mi nur songis.

-Kio okazis al mi? - mi demandis de iu viro.

-Vi terenfalegis sur la betonon de sur ĉi marŝipo. Oni pensis, ke vi mortis.. Eble unue vi falis sur tiujn ĉi kartonskatolojn kaj ili mildigis la falon. Tiel vi saviĝis.



Mi ne volis, sed la ambulanca aŭto liveris min al la Urba Hospitalo, kie oni konstatis, ke mi bonŝance transivis tiun ĉi teruran akcidenton, eĉ nokte mi ne devos enhospitaliĝi. Mi povis iri hejmen.

Surstrate mi iom malgajis, ĉar tro frue mi devis forlasi tiun ĉi novan, belan mondon.

Fino

**-Apáti Kovács Béla-**



# Por infanoj

## La ruĝa pilko

En malproksima vilaĝo vivis knabeto. Lia patro mortis antaŭ jaroj pro motorcikloakcidento.

Ili estis tre malriĉaj. Ofte mankis de sur la tablo eĉ la pano. Pro tio li suferis multe kun sia patrino.

La knabeto tre ŝatis piedpilki. Kun la lernejanaj knaboj ĉiutage li futbalis en la sportejo.

Liaj amikoj ĉiuj havis pilkon, nur li estis la unusola, kiu ne posedis propran. Vane li petis sian patrinon, ke ŝi aĉetu ĝin ankaŭ al li. La virino larmokule diris al sia fileto:

-Karulo, ja vi scias, ni ne havas monon por pilko.

Li sciis, sed tamen li ravadis pri ĝi. Multfoje li imagis, ke bona feino iutage surprizos lin per bela, ruĝa pilko.



Bedaŭrinde tiu bona feino ne volis alveni kun ĝi. Tagoj pasis unu post la alia, sed la knabeto ne havis pilkon.

Tio estis tre malĝoja, ĉar la knaboj primokis lin pro tio.

-Kia knabo vi estas, se vi ne havas pilkon. Foriru el la sportejo! Ni ne permesas futbali kun ni sen pilko. Tie ĉi nur tiu knabo rajtas piedludi, kiu havas propran ludilon. Ĉu vi komprenis?

Tiutage li iris hejmen plorante. Lia patrino vane demandadis, kio okazis al li. La knabeto silentis kaj ne malkaŝis sian malĝojon.

Dum la tuta tago li ploris en la ĉambro. Tiel li endormiĝis kaj li havis strangan sonĝon. Belega feino ekaperis kaj ŝi diris al li:

-Morgaŭ matene iru al la ĝardeno, Tie estas granda juglandarbo, kiun ankoraŭ via avo plantis. Iru tien kaj rigardu kio estas sub ĝi!

Matene vekigante la knabeto pensis, ke tio estis nur sonĝo, kaj vane iri en la ĝardenon, sub la juglandoarbo estos trovita nenio.

Malgraŭ tio li iris en la ĝardenon. Lia patrino ne komprenis, kion volas ŝia fileto frumatene tie. Ŝi staris ĉe la fenestro kaj rigardis lin. Ŝi aŭdis nur laŭtegan ĝojkrieton kaj post kelkaj momentoj li kuregis portante grandan, ruĝan pilkon. Li feliĉe diris al sia patrino:



-Panjo, en la ĝardeno sub la juglandarbo mi trovis ĉi tiun pilkon. Mia sonĝo realiĝis.

Li detale rakontis pri sia nokta sonĝo. Dume la virino ridetis kaj milde karesis la kapon de la knabeto kaj ŝi diris:

-Certe via paĉjo aŭskultis vian deziron tie supre en la ĉielo, kaj li donacis al vi ĉi tiun belegan, ruĝan pilkon.

-Eble - li diris kontente, kaj fikse rigardis la pilkon. Ŝajnis apenaŭ li atendas iri al la sportejo por futbali kun siaj amikoj.

Fine la virino diris al li.

-Venu kara mia por preĝi. Ni danku al via paĉjo tiun ĉi belan donacon.

**-Onklo Adalberto-**



# Virinoj



# Virinoj

